



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tel. 02 35 69 66 09
Kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

SUKCESA NACIA KONGRESO

Ni gratulu la membrojn de Esperanto - Cotentin kiuj sukcesis tre bone organizi nacian kongreson de Fervojistoj en Portbail.

Preskaŭ 100 kongresanoj kunvenis tie el tuta Francio. Ankaŭ partoprenis la kongreson eksterlandaj samideanoj el Italio, Belgio, Rumanio, Hispanio, Ĉekio, Japanio, Hungario.

Ĝus alveninte, afablaj georganizantoj donis al ni kongreslibreton, turisman dokumentaron kaj belan vazon plenan da karamelbombonoj.

Loĝeblecoj estis tre komfortaj en VVF. Ĉiuj disponis loĝejon kun hejtataj dormĉambroj. La plaĝo distancis nur kelkajn centojn da metroj.

Interkonatiĝa vespero okazis vendrede kun prezentado de la regiono.

Sabate matene, okazis la oficiala malfermo de la kongreso kaj la debatoj koncernantaj la vivon de tiu movado.

Sylviane Lafargue, Prezidantino de FFEA (Franca Fervojista Esperantista Asocio) kore bonvenigis ĉiujn. Ŝi diris ke tiu kongreso estas grava ĉar ĝi situas inter Bulonja centjariĝo en 2005 kaj internacia IFEF kongreso en 2007. Ŝi aldonis : " Ni estas feliĉaj ke la membroj de Normanda Esperanto Asocio samtempe organizas sian jarkunvenon. S-ino Magdalena Lelouey kaj nia honora prezidanto Pierre Robiollé atente pretigis tiun aranĝon. Mi deziras ke vi ĝuu riĉan kulturen kaj turisman programon."

Sabate vespere okazis la bankedo kun normanda folkloro spektaklo kaj ni ĉiuj kune kantis "Ma Normandie".

Dimanĉe matene, post interesa prelego de Rodica Todor pri Rumanio kun lumbildoj, okazis trapaso de ekzamenoj kaj kunveno de kursgvidantoj. Posttagmeze, dum la fervojistoj ekskursis al Valognes, kunvenis la membroj de "Esperanto-Normandie". La protokolon de tiu kunveno vi legos aparte sur tiu bulteno.

Plej multaj kongresanoj ne estis vizitintaj la regionon "Cotentin" Ili do malkovris ĝin okaze de la ekskursoj kiuj estis tre variaj, kaj tre interesaj. Du plenaj aŭtobusoj estis je nia dispo. Domaĝe ke la vetero ne estis ĉiam suna. Ofte pluvombreloj ne estis uzablaj pro ventego kiu returnis ilin ! Ni ekskursis al Saint Sauveur le Vicomte, al Valognes, Saint Vaast, Barfleur, La Hague, Jobourg, Vauville, Briquebec.....Ni vizitis muzeojn, Cité de la mer en Cherbourg, cidrodistilejon kun gustumado de pombrando (Calvados), ventomuelilon, fabrikan de biskvitoj, germanajn militbateriojn. Ni provis ne rigardi la nukleajn instalaĵojn de Flamanville kaj de la uzino Beaumont : tiu grandega areo grandskale modifis la aspekton de iu regiono kiu antaŭe tute ne estis industria; por vizitanto, temas pri vera ŝoko kultura kaj estetika. Sed ni forgesu tion. Preferinde, ni memoru "Le nez de Jobourg" (La nazo de Joburgo) kiu estas la plej fama loko de La Hague. Ĉi-tie, la klifoj estas la plej altaj en Eŭropo. Kiam la suno subiras en la maron, la spektaklo fariĝas mirinda. De tie, oni povas daŭrigi piede la promenadon, dank'al la "pado de la doganistoj" kiu serpentumas laŭlonge de la marbordo.

Sed alvenis la tempo de la disiĝo : preskaŭ ĉiuj kongresanoj revenis hejmen jaŭde matene. Ili bone simpatiis, unuj la aliajn. Ili bone diskutis per amikeca lingvo; ili bone gustumis normandajn manĝaĵojn kaj trinkis francan vinon, normandan cidron kaj kalvadoson; ili konatiĝis kun normanda vivmaniero; ili admiris belegajn pejzaĝojn. Dankon Magdalena kaj aliaj geamikoj de "Esperanto-Cotentin" kiuj organizis sukcesan kongreson.

Antaŭ kelkaj jaroj, estis en tiu parto de Normandio nur kelkaj izoluloj. Nun estas grupo kapabla organizi nacian kongreson. Vi pruvis ke ni ĉiam devas esperi !

Petro KIJŲ

ASSEMBLEE GENERALE D'ESPERANTO NORMANDIE LE DIMANCHE 9 AVRIL 2006 à PORT - BAIL (MANCHE)

Notre association a profité de l'organisation du congrès national des cheminots espérantistes pour tenir sa propre assemblée générale dans le VVF de Port Bail.

23 personnes étaient présentes et 16 avaient envoyé leur pouvoir, venant des groupes de Hérouville / Caen, Rouen / Grand Quevilly, le Havre, Granville, Cherbourg, Saint Lo et autres localités.

La séance a été ouverte à 14 h 15, sous la présidence du Président de l'association : Sébastien Erhard.

Christian Lévesque s'est proposé pour prendre des notes concernant le déroulement des débats.

Des félicitations et des remerciements ont été adressés au jeune groupe de Cherbourg qui a organisé avec succès un congrès national, ce qui nécessite beaucoup d'enthousiasme et de courage. Bravo à toute l'équipe du groupe Espéranto Cotentin !

Petro Quillaud a rappelé que nous nous étions réunis le 19 Juin 2005 en une assemblée générale extraordinaire pour entériner la fusion des deux anciennes associations en une seule :

Union des Espérantistes de Normandie et Fédération Normande des Centres Culturels Espéranto et que nous avons élaboré des nouveaux statuts, selon le modèle proposé par Esperanto -France et adopté par les autres fédérations régionales. Un règlement intérieur devrait compléter ces statuts.

Pour des raisons de commodité, les nouveaux statuts ayant été déposés à la Préfecture de Seine -Maritime, le siège social de l'association a été fixé au domicile du trésorier à Grand Quevilly.

Il est rappelé que notre association est une Fédération de groupes et de militants isolés.

GROUPES : Une discussion s'engage sur la nature des groupes

- A Rouen et à Grand Quevilly, il n'existe pas de groupe constitué bien que plus de 25 familles espérantistes demeurent dans l'agglomération. Lors d'événements particuliers, tels que visites d'espérantistes étrangers, Petro KIJ0 réserve une salle municipale et convoque les espérantistes de l'agglomération. Catherine Domingo fait un cours à Rouen ; elle est remplacée par Sébastien si nécessaire.

- Les groupes du Havre, de Cherbourg, d'Hérouville Saint Clair sont des associations déclarées à la Préfecture. Ils ont déposé des statuts, ils perçoivent des cotisations et ils peuvent éventuellement demander des subventions aux instances municipales, départementales etc....

Ces groupes organisent des cours d'initiation, de perfectionnement, de conversation.

RAPPORT MORAL : Notre association régionale ne peut que fédérer les actions engagées par les groupes locaux.

Les activités d'Espéranto-Normandie sont surtout les tournées de conférenciers étrangers organisées par Yves NICOLAS et la parution régulière de " Normanda Bulteno" par Petro

Le Conseil d'Administration ne s'est réuni qu'une seule fois durant l'exercice 2005. A la suite de défections, le bureau du conseil n'était plus constitué que du président et du trésorier.

Le "Normanda Bulteno" a paru régulièrement en mars, juin, septembre et décembre. Selon les articles envoyés, il comporte 6 ou 8 pages. C'est une tribune libre ouverte à tous.

Le Rédacteur ne reçoit pas de critiques mais désire être remplacé dans cette fonction: Un nouveau rédacteur est en vue; il remplacera P.Quillaud après la période des vacances.

Des panneaux d'exposition édités par Esperanto - France ont été commandés: Une série de 12 panneaux pour la Haute Normandie et une autre série pour la Basse Normandie sont à la disposition des groupes et des isolés. Une série de 5 panneaux visant particulièrement les jeunes et les lycéens pourra tourner dans les 2 régions normandes.

RAPPORT FINANCIER :

Ce rapport est paru dans le numéro de Mars 2006 de " Normanda Bulteno"

Le contrôleur aux comptes Pierre Jouvin confirme l'exactitude du rapport

Petro Kijo souhaiterait également être déchargé de cette charge qu'il accomplit depuis de nombreuses années

VOTE : Le rapport moral et le rapport financier sont approuvés à l'unanimité.

Adhérents d'Espéranto - Normandie et abonnés à "Normanda Bulteno"

Une discussion s'engage: Doit-on considérer les abonnés au bulletin comme des membres de l'association ? La situation actuelle est très confuse. Jusqu'à maintenant, nous avons confondu les abonnés et les adhérents. En effet, aucun adhérent n'a signé un bulletin d'adhésion. Si nous devons faire un distinguo, faudrait-il créer une cotisation qui s'ajouterait à l'abonnement. ? Il est décidé de considérer que les abonnés sont des adhérents.

Contrat avec Esperanto - France :

Petro KIJ0 lit le modèle de contrat proposé entre la fédération normande et Esperanto-France. Les buts des deux associations sont conformes mais quelques personnes désirent de plus précises informations. Pour les adhérents d'Espéranto-Normandie qui sont également adhérents d'Espéranto-France, il n'y a aucun problème. Mais notre Fédération devra-t-elle verser une cotisation pour ceux qui ne sont pas membres de l'association nationale ? Il est décidé de surseoir à cet accord. *Entre temps nous avons appris qu'Espéranto France n'exigeait pas de cotisation*

mais au contraire nous verserait une ristourne en fonction des adhérents d'Esperanto France demeurant en Normandie). Le C.A. décidera

Activités à venir :

Il serait souhaitable d'envisager :

La création d'un site Internet

Des pique-nique intergroupes pour bien se connaître et créer des liens d'amitié

Présentation d'un film "Le Printemps japonais" par Gérard Sénécal

Liaisons Esperanto Normandie - Groupes locaux

Nouveau Conseil d'Administration

Le C.A. sera constitué d'un ou deux représentants par groupe :

LE HAVRE : Sylvie Caron, Patrice Dufeu

HEROUVILLE : Yves Nicolas, Christian Colbert

GRAND QUEVILLY / ROUEN : Petro Quillaud, Catherine Domingo, Sébastien Erhard

SAINT LO : France Thomasse

CHERBOURG : Madeleine Lelouey, Jacques Lebever

GRANVILLE : Christian Lévesque

et tout autre membre actif de l'association

Contrôleur aux comptes : Les comptes ont été contrôlés par Pierre Jouvin. Il est réélu à l'unanimité

La réunion de l'assemblée générale s'est terminée vers 17 h.

Le manque de temps n'a pas permis de procéder au renouvellement du bureau. Provisoirement, restent Président Sébastien Erhard et trésorier Petro Quillaud. La fonction de secrétaire est provisoirement assurée par le trésorier rédacteur (Cumul !!!) Le bureau sera complété ultérieurement. Christian Lévesque suggère que la prochaine réunion dure 2 jours, comme ce fut le cas à Jullouville (*Cela est souhaitable à condition qu'un groupe se propose pour l'organiser*)

Petro Kijo et Christian Lévesque

UNUA LISTO de KOTIZINTOJ por 2006

Rigardu ĉu via nomo aperas en ĉi-suba listo :

Bessière, Caron, Chalm, Colbert, Corrieu, Dubois, Dubuc, Dufeu, Duval, Dufresne, Evrard, Gibert, Guérout, Guerre, Guilmot, Hébert, Huet, Jean, Jouvin, Lamy, Langeois, Lardeur, Lebrun, Lehericey, Lemarchand, Lesueur, Lévesque, Loisel, Michaud, Nardin, Nicolas, Pottier, Quillaud, Rauch, Rousseau, Rousseau-Pellico, Robiolle, Sénécal, Séry, Tanguy, Touileb, Zilliox

Estu afablaj kun via kasisto. Pagu vian kotizon por ke mi ne bezonu sendi al vi admonleteron !

Atentigo : unu kotizo sufiĉas por tuta familio sed ni ankaŭ plezure akceptas mondonacon

ĜEMELECO INTER MALSUPRA SAKSIO KAJ NORMANDIO

Saksio kiu eldonas la bultenon "La Verda Saksofono" kaj Bretonio kiu eldonas "La Verda Triskelo" estas ĝemelitaj regionoj.

"La verda Triskelo" (*motif décoratif celtique*) celas intensigi la interrilatojn inter Esperanto-parolantoj en Bretonio kaj en Saksio. La temo de la nuna kajero estas "Vivo en kamparo", tiu de la venontjara (en 2007) estos "Kulinara arto" Kontribuoj estas atendataj de Esperanto-amikoj el la grupoj en tiuj du regionoj

Jen kelkaj titoloj :

- Pasinta tempo en la kamparo

- La bovinoj

- Kampara Bretonio

- Evoluo de agrokulturo en Bretonio

- La forĝejoj de Paimpont en la fama arbaro de Brocéliande

- La paskaj kutimoj. La birda edziĝfestoj

... ktp...

Mia korespondanto Klaus Schlüter loĝas apud Hannover. Mi sendas al li "Normandan Bultenon" kies elĉerpojn li aperigas en dissendolisto de sia regiono. Li opinias ke ni povus fari same inter Malsupra Saksio kaj Normandio. Li sugestas ; " Ĉu ne estus bona ideo, se ankaŭ ni kolektus rakontojn kaj raportojn el nia regiono por komuna publikigo en niaj reciprokaj bultenoj ? Kiu el la legantoj pretas organizi tion ?

Petro KIJ0

CU VI JAM VOJAĜIS PERE DE "PASPORTA SERVO" ?

Se jes, mi nenion sciigos al vi. Se ne, tiu artikolo celas doni al vi ideojn aŭ dezirojn. Kio estas Pasporta-Servo ? Ĝi estas adreslibro, eldonaĵo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) por ĉiuj Esperanto - parolantoj. La eldonaĵo 2006 enhavas 1320 adresojn de gastigantoj en 92 landoj.

Ĉiu kiu posedas aŭ aĉetas propran ekzempleron de tiu adreslibro tuj iĝas membro kaj rajtas uzi ĝin por havi la eblon ricevi senpagan gastadon

Unuafoje, mi kaj Gigi (mia edzino), uzis Pasportan Servon dum la jaro 2000 poe sessemajna vojaĝo tra Japanio. Kial do Japanio ? Pro tio ke en 1998, ni gastigis japanan junulinon kiu vizitis Francion " laŭlonge kaj laŭlarĝe", antaŭ kaj post la Universala Kongreso en Montpellier, uzante tiun adreslibron. Ŝi invitis nin ĉe siaj gepatroj kaj aldonis : " Por viziti Japanion, faru kiel mi, uzu Pasportan Servon ! " Kaj tiel ni faris.

Ni sciis preskaŭ nenion pri tiu lando. Ni aĉetis gvidlibrojn kaj laŭ niaj ĉefaj intereso, ni skizis itineron Sekve, sur Pasporta Servo, ni serĉis la plej taŭgajn lokojn kaj gastigantojn en tiuj lokoj aŭ sufiĉe proksime de la elektitaj urboj. Post korespondado kun ĉiuj elektitaj gastigantoj, ni finarangis nian vojan planon por ses-semajna vojaĝo kvankam ni unue antaŭvidis nur kvarsemajnojn maksimume.

Ni ne povis imagi kiamaniere ni estus akceptotaj ! Ni vizitis dek diversajn domojn kaj Oomoto Centron kiu estas aparta loko kun aliaj kondiĉoj. En ĉiuj familiaj domoj kaj apartementoj ni ĝuis eksterordinarajn kaj feliĉajn travivaĵojn. Tute japaneske, ni manĝis, dormis, veturis, turismis... Nur nia parolado ne iĝis japana ! Kaj kredis min, kiam la tutan tagon, vi parolas kaj aŭskultas la lingvon, kiam, eĉ nokte vi esperante revas, vi nepre kaj senpene progresas !

Ĉar ni amikiĝis kun multaj esperantistoj, mi daŭrigis plurajn korespondadojn. Kaj tio kio devus okazi fakte okazis ! : Denove, ni organizis duan vojaĝon al Japanio printempe 2005. Dum sep semajnoj, ni pli malpli sukcesis sekvi la floradon de la famaj ĉerizarboj, uzante ankoraŭfoje Pasportan Servon por trovi novajn pliajn adresojn

Travivante tage kaj nokte ĉe kaj kun niaj gastigantoj, ĉu eblas imagi plej bonajn kondiĉojn por elkovri la vivmanierojn, la pensmanierojn, la lokajn kutimojn, la kulturon de iu ajn loĝantaro ? Neforgeseblajn memorarojn ni daŭre enkapigis !

Ankaŭ alimaniere ni spertis Pasportan Servon en 2003. Ni longe vojaĝis tra Skandinavio (du monatoj kaj duono) pere de nia loĝaŭto (camping-car) Kiam ni preparis la vojan planon mi atente konsultis mian adreslibron kiu inkludis ĉiujn lokojn kie survoje troviĝis gastigantoj. Tiu dua vojaĝmaniero estas malpli rigida ol la unua en Japanio ĉar ni ĉiam tranoktis en la loĝaŭto kiu staris ĉu sur parkejo, ĉu en ĝardeno, eĉ foje surstrate. Plie, inter du lokoj kie ni povis renkonti kun esperantistoj, ni vojaĝis solaj dum pluraj tagoj. La du priskribitaj vojaĝmanieroj tute ne similis unu la alian sed ambaŭ havas siajn avantaĝojn

Do, bonvolu mem provi. Senprokraste, uzu tiun mirindan Pasportan Servon kiu, vere, estas mondŝlosilo por ĉiuj scivolemaj esperantistoj.

Gérard SENEAL
Grupo de Hérouville St Clair (14)

MESAĜO DE HAVRA ESPERANTISTA GRUPO :kontakto@tele2.fr

Le calendrier 2006 des escales des paquebots (jusqu'en novembre) est disponible en Esperanto à l'Office du Tourisme du Havre (Tél. 33 (0)2 74 04 04)
Fax: +33(0)2 35 42 38 39 - WWW.lehavretourisme.com

Attention ! Ce site d'envoi n'est pas espérantiste

Bernard Dufresne
Délégué à la communication

BONVENON EN NORMANDIO



La plimulto inter la partoprenantoj de tiu nacia fervojista kongreso ne ĝisfunde konas tiun regionon tiel nomata COTENTIN aŭ pli poetike : “ Duoninsulo de la ekstremaĵo de la mondo “.

Iom da historio pri nia regiono : Kiel vi ja scias, Normandio estas unu el la plej malnovaj francaj provincoj . Je la 6a jarcento, ĝi nomiĝis “Neustrio”, kaj konsistis el granda reĝlando, entenante la regionojn situatajn inter Bretonio, la riverego Lŭaro, la Manika maro kaj la riverego Mozo

Je la 9a jarcento, komenciĝis la invadoj de la Vikingoj. Cele ĉesigi la teruron generita de la kruelaj skandinavaj militistoj, la franca reĝo Karlo la Simpla starigis traktaton en la jaro 911a kun Rollon, unu el la ĉefmilitistoj de la Northmen (Nordaj homoj). Rollon rezignis pri disrabado kaj fariĝis Duko de la Okcidenta-Norda teritorio kiu rapide fariĝis Normandio.

La Normandoj facile integris sin al la loka popolo kaj valorigis la riĉajn agrokulturajn grundojn. La idoj de Rollon pligrandigis la normandajn posedaĵojn. Guillaume le Bâtard (Vilhelmo la Bastardo) venkis la Anglojn je Hastings en 1066 kaj fariĝis Duko de Normandio kaj reĝo de Anglio. En 1204, Philippe-Auguste (Filipo-Aŭgusto) proprigis al si Normandion, kiu, pro tio, fariĝis nur simpla provinco, perdante sian politikan aŭtonomion. Sekvis la nigra epoko, tiel nomata la centjara milito (1337 - 1453) .Normandio eliris el ĝi tre malforta, sed restos tamén riĉa agrokultura provinco.

Fine, pli proksime de nia epoko, la marbordoj de la malalta Normandio estis elektitaj por la elŝipiĝo de la aliancanaj trupoj en Junio 1944.

Tiuj lokoj kaj plaĝoj estis unu el la epizodoj la plej sangerverŝaj de tiu tragedio. Ĉiu kvadrata metro da sablo aŭ da duno vidis la la buĉoferon de tiuj junuloj venintaj morti sub la stela standardo por redoni al ni la liberecon.

La malalta Normandio restos vundita dum longaj jaroj. Ĝiaj cikatroj estas ankoraŭ videblaj en multaj lokoj kiujn vi vizitos.

Hodiaŭ, tiu regiono sin proponas al vi, kun ties maro kiun vi vidos kolore ŝanĝi plurfoje en la sama tago, ties variaj pejzaĝoj, ties gastronomio kies fameco ne plu estas farota. Nenion manku !!

Pierre ROBIOLLE

Honora Prezidanto de FFEA

La ĉi-supra teksto estas eltirata de la Kongreslibreto donita al partoprenintoj de la Nacia Kongreso de Fervojistoj en Port-Bail de la 7a ĝis la 14a de Aprilo 2006.

Pierre Robiolle ankaŭ deziris al kongresanoj fruktodonajn laborojn dum la laborkunsidoj kaj ĝojan etoson dum tuta kongressemajno.

*Dum la bankedo, venis normanda folklora grupo, ĝi estis tre ĉarma kaj plenviva.
Ĝi prezentis al ni tre gajan spektaklon kaj ĝi kantigis kaj dancigis tutan kongresanaron
Kompreneble la lasta kanto estis la fama tradicia " Ma Normandie " Bedaŭrinde mankis
la esperanta traduko.
Ĉi-sube, legu ĝin, parkere lernu kaj kantu ĝin !*

MIA NORMANDIO

Je renaskiĝo de l'espero,
Kaj kiam vintro estas for,
En franca dolĉo de aero
Dum brilas la sunluma or'
Dum reverdiĝas la naturo,
Kaj de hirund reĝojas kri'
Min logas mia Normandio;
En tiu lando ja naskiĝis mi.

Mi vidis monton Helvetian
Kun lignodom' kaj glaciār'
Kaj la pejzaĝon italian
Kun bark' sur Venecia mar'
Al ĉiu hejmo, jen saluto !
Neniu ĝin meritas pli
Ol mia bela Normandio ;
En tiu lando ja naskiĝis mi.

Dum vivo venas la momento
En kiu revo flugas for,
Kaj la animo en silento,
Dediĉas sin al rememor'.
Se tiam mia laca muzo
Amkantojn lasas for de si,
Reiros mi al Normandio;
En tiu lando ja naskiĝis mi.

Frédéric Berat
Tradukis L. Thévenin

ESPERANTO NORMANDIE deziras al siaj membroj : AGRABLAJN SOMERAJN FERIOJN

*Profitu liberan tempon por partopreni diversajn esperantistajn aranĝojn : kongresoj, internaciaj
feriejoj, akcepto aŭ vizito al viaj korespondantoj. Tiel, vi perfektigos kaj pli konvinkigos pri la
valoro de nia komuna lingvo*

Sekvanta "Normanda Bulteno" aperos septembre kondiĉe ke vi sendu al mi artikolojn !!!

La redaktoro